# EKO 2025

Pense, mense, science

EKO 2025-31 Julio 23 Pezo: 600 KB

## Sciencо rekonata




Dum la UK en Brno okazos ankaŭ disdono de *Premio Pirlot*, por la plej bonaj sciencaj libroj eldonitaj en la lastaj jaroj, kiu estas organizita ĉiun duan jaron de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Lastfoje ĝi estis disdonita en 2023 en Torino.

La limdato por proponoj estis la **15-a de julio**. Krom la limdato, ankaŭ la sumoj de Premio Pirlot estis modifitaj: la unua premio estos € 500, la dua € 300 kaj la tria € 200.

## Rezultoj el la 62-a universitata kunpensado

Joel Muhire parolis pri sia libro por lerni Esperanton en la svahila, kiun ILEI eldonis papere por la UK de Aruŝo kaj nun ankaŭ bite. Ĝi elŝuteblas el la retejo de ILEI. Joel ankaŭ planas verki libron por lerni la svahilan en Esperanto kaj kelkaj lecionoj jam aperis en la revuo *La Konga Stelo*. Giridhar Rao kaj Probal Dasgupta parolis pri esperantistoj en barataj universitatoj kaj retkurso en fama universitato, kiun finis 10 homoj. Giri ankaŭ parolis pri sia traduko de la vivo de Gandhi, korektita de Michela Lipari kaj Fernando Pita, kaj pri scienc-fikcioj. La parolado estis tre interesa kaj meritus spektadon. Brucjo Kasini parolis pri kongreseto, kiun li estas organizanta en Pisa, kun seminario pri ĵurnalismo en la Universitato de Pisa. Mi iom enkondukis la Simpozion de ILEI 2025 pri "AI kaj Kulturo", en kiu esperebIe povos partopreni surpriza gasto. La venonta Kunpensigado estos en Septembro, pri Irano.

***SMG:*** Jen ligilo: en la registraĵo de la kunsido spektebla en la jutuba kanalo de UEA: 62- Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj

Sendis: Alessandra Madella

## Astrofiziko kaj artistoj

Okazis la solena inaŭguro de la Baltiaj Esperanto-Tagoj en Kaunas, Litovio, i.a. kun la vicprezidanto de la Litova Parlamento, kun esperantista ano de la Eŭropa Parlamento kaj ĉ. 250 kongresanoj el pli ol 30 landoj.

Finiĝis la 59-a BET. Disdonitaj en la fermo estis AIS-atestiloj de la kurso de Amri Wandel pri astrofiziko. La programo enhavis koncertojn de **ĴomArt , Amo** kaj Nataŝa, JoMo kaj aliaj, kaj ekskurson al Trakai.

## Interlingvistoj nutrataj

Nun haveblas la numero 132 de Informilo por Interlingvistoj (IpI):

http://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2025/07/IpI132.pdf

IpI - kaj ĝia anglalingva versio, IfI - estas eldonataj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Niaj novaĵleteroj disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por esploristoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri lingvopolitiko, Esperantologio kaj rilataj temoj.

La antaŭaj numeroj de IpI estas disponeblaj en:

https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo/

ipi@interlingvistiko.net

## Slovenaj novaĵoj

Jen la 2-a numero de la ĉi-jara bulteno *Informacije / Informoj*. Ĝuu la legadon kaj bonvolu pritaksi la ŝanĝojn. Viaj komentoj estas bonvenaj.
Indas viziti la retejon de SIEL, kie vi trovos pasintajn numerojn de la bulteno, la katalogon de nia biblioteko kaj aliajn utilajn informojn. La ligilo: https://esperanto.si/eo

Ostoj KRISTAN, sekretario de SIEL

## La prezidantino de IFEF prezentas sin

Andrea ŠVUBOVÁ. la nova IFEF-prezidantino skribas en la plej freŝa numero de *Internacia Fervojisto*: “Ni ne estas nur teknika kaj lingva asocio. Ni estas vivanta pruvo, ke internacia kunlaboro kaj interkompreniĝo estas ne nur idealoj, sed ĉiutaga realeco. En la tempo kiam antaŭ ni staras ne malgrandaj alvokoj – de klimatŝanĝoj ĝis socia polusiĝo – estas nia misio pli aktuala ol antaŭe. La mondo rapide ŝanĝiĝas – teknike, ekonomie kaj eĉ socie. En tiu ĉi dinamika medio la fervojo ludas ŝlosil-rolon kiel ekologia, fidinda kaj sekura maniero de transporto. Same ankaŭ nia lingvo – neŭtrala, justa, facile eklernebla – restas aktuala ilo de internacia komunikado precipe en areoj, kie la dialogo estas pli grava ol iam ajn antaŭe.

Mia imago pri estonto de IFEF estas klara: Esti la ponto. Ponto inter nacioj, profesioj kaj generacioj; Subteni ne nur teknikan kunlaboron kaj interŝanĝon de spertoj inter fervojistoj, sed ankaŭ krei areon por kultura pliriĉiĝo kaj amikeco pere de Esperanto.

## Ekzamenoj en NASK, baldaŭ en Brno

Okazis KER-ekzamenoj en la niveloj  B1, B2 kaj C1 la 11-an de julio, kun kandidatoj el Argentino, Usono (2), Italio (2), Britio, Hispanio kaj Luksemburgo.

## Azia kunlaboro

En la 6-a de julio s-ro Ayaz Ahsan el Pakistano vizitis la Seulan Esperanto-Kulturcentron gvidate de s-inoj Oazo kaj Ester'. Ashan estas nevo de s-ro Saeed Ahmad, kiu estas konata pakistana esperantisto. //foto

## Francoj kunis en Nantes

La ĉi-jara kongreso de Esperanto en Francio okazis de la 7-a ĝis la 9-a de junio en la urbo Nantes ĉe la atlantika marbordo kun 150 esperantistoj el ok landoj. Legu la prikongresan artikolon de Bruno Robineau, kiu aperis en la junia eldono de *La Ondo de Esperanto* kaj en la samtitola novaĵretejo https://sezonoj.ru/2025/07/francujo-24/.

Fonto: Internacia Fervoja Ĵurnalo

## Inda onda inundo

En nia elŝutejo aperis la junia eldono de *La Ondo de Esperanto*, n-ro 324. Ni esperas, ke ĉi tiu 139-paĝa *Ondo* plaĉos al vi. Ĝi elŝuteblas de:

https://esperanto-ondo.ru/Aktualaj/Ondoteko.php

La dosieroj ("pdf" kaj "ePub") estas elŝuteblaj per viaj "nomo" kaj "pasvorto". Se vi forgesis ilin, skribu al ni kaj ni resendos ilin al vi. La tria eldono (septembra/aŭtuna) de *La Ondo de Esperanto* por 2025 estos preta fine de septembro aŭ komence de oktobro.

Se dum la komenciĝinta Kongresa Sezono vi partoprenos interesan esperantistan kongresan renkontiĝon, sendu al ni prian artikolon (kaj fotojn).

Halina Gorecka (eldonanto)m Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

## Trevor Steele kaj verkemo

Aperis nova kaj interesa artikolo en la retejon uea.facila.org, kiun prizorgas **Anna Löwenstein** kun siaj kunlaborantoj (https://uea.facila.org/kunlaborantoj/). La artikolon verkis **Trevor Steele** kun titolo **Kial mi verkas?**, kaj voĉlegis ĝin **Hanso Becklin**:

https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/kial-mi-verkas-r481/

## UK-oj pli frue en Ĉeĥio

Tuj antaŭ la malfermo de la 110-a UK en Brno, ni proponas (re)legi la artikolon de Halina Gorecka pri la antaŭa UK en Ĉeĥio pri la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta ekde julio 1996 en Prago. Legu ŝian artikolon "UEA unuafoje kongresis en postkomunisma lando" en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/07/prago/

## Fervoje sub la alpoj; jen la tria moderna tunelo

La Baztunelo Brenner (BBT) estas destinata fariĝi unu el la plej imponaj kaj strategiaj infrastrukturprojektoj en Eŭropo. Situita sub la Brenera pasejo, ĝi kunligas Italion kun Aŭstrio trans fervoja tunelo longa 55 km, kiu etendiĝos de Fortezza (Bolzana provinco) ĝis Innsbruck. Post kompletigo, ĝi estos la plej longa fervoja tunelo en la mondo, kontribuanta decide al la ŝanĝo de ŝosea al fervoja var-pasaĝertrafiko laŭlonge de la skandinavia-mediteranea koridoro. Nuntempe, la laboro progresas kun tri ĉefaj aktivaj

konstruejoj: unu en Italio kaj du en Aŭstrio. Ĝis la 30-a de aprilo 2025, 191 km el 230 km estis elfositaj: el kiuj 89 km da trajnaj transittuneloj, 57 km da esplora tunelo kaj 45 km da aliaj tuneloj.

Laŭ la Eo-revuo de la italaj fervojistoj.

***SMG*** memoras vojaĝon laŭ la Brenera pasejo antaŭ tridek jaroj. Tiam, la trajno devis ege grimpi por atingi tunelon (eble 5 km longan) kaj poste subeniri laŭ kruta kaj kurboplena sed ja bela vojo.

## La Ukraina lingvo formale protektita

La 16-an de julio 2019, la leĝo "Pri Certigo de la Funkciado de la Ukraina Lingvo kiel Ŝtata Lingvo" ekvalidis en Ukrainio. Antaŭe, la statuso de la ukraina lingvo estis reguligita per la leĝo de Ukrainio "Pri la Principoj de Ŝtata Lingvopolitiko" (la tiel nomata "Leĝo Kivalov-Kolesniĉenko") — ĉi tiu dokumento estonte povus konduki estontece al anstataŭigo de la ukraina lingvo per la rusa (moskva).

## Fotistoj de la mondo – enfokusiĝu!

En la 18-a de julio 2025 nova esperantisto naskiĝis tra la 379-a kurso de Seula Esperanto-Kulturcentro. La diplomitino Sunera SON estas profesia fotisto. Se iu el vi estas fotisto, mi volonte prezentos vin al Sunera, kiu volas korespondi kun fotistoj en la monda Esperantujo.




========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
ilei UMEA IKEF
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.